# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ

## 3.7.1. Malavara junulo (unua parto)

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

El la kolekto *Kubaj popolaj fabeloj* de Marin Bacev,
elsendita je 2004/01/17, legas Barbara Pietrzak.

Taskoj:

***1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj:***

a) en formato MP3: http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/eroj/ed_pr13a.mp3 aŭ
b) en formato RealAudio: http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/eroj/ed_pr13a.rm

***2) Bonvolu rigardi la subajn demandojn kaj poste denove aŭskulti la elsendaĵojn. Post tio provu respondi al la demandoj***:

1. Kion deziris fari la junulo?
2. Kion donis al li la patro?
3. Kiun beston unue ekvidis la junulo sur sia vojo al la vasta mondo? Ĉu ĝi bone fartis?
4. Kion donis al ĝi la junulo?
5. Kiujn bestojn li poste renkontis? Ĉu ili bone fartis?
6. Kion donis al ili la junulo?
7. Kiujn bestojn li ankoraŭ poste renkontis sur la monto? Ĉu ili bone fartis?
8. Kion donis al ili la junulo?
9. Fine, kien alvenis la junulo? Kiel li intencis vivteni sin tie?
10. Kia estas la maljuna servisto? Kio lin obsedas?

**Demandoj pri la teksto (pripensado)**

11. Kion en praktiko signifas «ĉirkaŭiri la mondon», «vidi la vastan mondon» k.s.?
12. Kio en la rakonto montras, ke temas pri fabela mondo?
13. Kio aspektas al ni eksterordinara en la konduto de la junulo?
14. Ĉu vi pritaksas lian konduton bona aŭ malbona?
    Ĉu havus sencon en la normala mondo doni akvon al «soifanta» fiŝo, panon kaj viandon al malsataj formikoj kaj agloj?

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net kaj ni sendos ilin.